


Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago №9, Septembro, 2008

*Kara leganto, la ĉi-monata ĉefartikolo estas dediĉata al unu el la plej malnovaj E-kolektivoj de Germanio, al Hamburga Esperanto-Societo. E-stoj el la ĝemelurbo de Ŝikago, kiu gastigis kvinfoje la Germana E-kongreson (1931, 1956, 1967, 1974, 1986) kaj eĉ Universalan Kongreson en 1974. Korajn dankojn al s-ro Jürgen Wulff pro la senditaj materialoj. Do, ek al la konatiĝo!*

# Hamburga Esperanto Societo

La 19an de Majo 1904 estis fondita Esperantista grupo Hamburg-Altona (la grandurbo Altona tiam apartenis al Prusujo). Tiam kelkaj malmultaj interesuloj pri la demando de Internacia Lingvo kunvenis por diskuti la propagandon de tiu ideo. Inter ili troviĝis la kuracisto d-ro Eduard Mybs, antaŭe fervora volapukisto, kiu same kiel multaj aliaj post apero de Esperanto, estis transirinta al tiu nova sistemo. Dank' al siaj lingvaj fakkonoj kaj sia ege simpatia bonhumoro, li facile sukcesis tuj fondi unuiĝon kies prezidanto li fariĝis. En 1908 li kunorganizis kaj prezidis la 4an Ukon en Dresdeno.

Poste aperis en Hamburgo kelkaj aliaj E-kolektivoj, kiuj komune formis la “Hamburgan Gruparon”. Ĉio bonege funkciis, ĝis kiam sekve de la Naci-reĝimo la Movado en la urbo tute ĉesis ekzisti.

Oni devas mencii, ke ĝuste antaŭ 108 jaroj, la 12an de Septembro 1910 d-ro L. Zamenhof alvenis per ŝipo al Hamburgo, kiam li revenis de la 6-a UK en Vaŝingtono. Pro tiu okazo la hamburgaj E-istoj invitis al festkunveno, dum kiuj oni omaĝis al la Majstro.

* * *

La laborista E-movado (GLEA) JAM TUJ Ĉe la komenco de la Nazia reĝimo en Marto 1933 estis malpermesita, kune kun ĝenerala malpermeso de la politikaj, sindikataj kaj kulturaj laboristaj organizaĵoj. Multaj laboristaj E-funkciuloj estis arestitaj kaj senditaj al malliberejoj aŭ koncentrejoj. La neŭtrala Movado ankoraŭ vegetis kelkajn jarojn. La naziaj leĝoj postulis, ke ĉiu asocio estu konforma al la ŝtata sistemo. Sed, la neniigo de E-o jam estis decidita.

* * *

Multaj aktivaj E-istoj en Hamburgo tuj post la fino de la II Mondmilito daŭrigis la E-laboron (18 el 56, vidu Saluton! 6, 2005, kiam M. Ŝafrot prelegis pri la E-filmo “Mefisto”). En Novembro 1945 la Brita Armea Administracio permesis fondi kulturajn klubojn, do ankaŭ eblis fondi E-klubon. La 19an de Novembro 1945 en la loĝejo de Bünemann okazis fondkunveno. Unue oni elektis la nomon “Hamburga E-societo”. Oskar Bünemann restis prezidanto ĝis la 70a vivojaro en 1955.

La Polica Prezidanto en Hamburg 1948 permesis al policistoj, dum la deĵora tempo lerni E-on kaj zorgi pri la eksterlandaj vizitantoj. Preskaŭ 150 gepolicistoj lernis E-on, el kiuj 60 post la ekzameno rajtis porti sur la uniformo rubandon kun surskribo “Esperanto”.

Por ekscii pri la moderna E-movado en Hamburgo bonvolu viziti onian retejon: www.esperanto-hamburg.de



*Interkona Vespero, Mariko, Gerald, Jurgen, Ralph*

## 2009 Kongresurbo, Bjalistoko

Preskaŭ 300-mila Bjalistoko estas la plej granda urbo de la nord-orienta parto de Pollando kaj la ĉefurbo de Podlaĥia Vojevodio. Ĝi funkcias kiel administra, ekonomia, scienca kaj kultura centro de tiu regiono, kiun oni nomas „Verdaj Pulmoj de Pollando”. Situo de la urbo en ekologie pura kaj turisme alloga regiono, riĉa infrastrukturo de Bjalistoko igas ĝin kaj ĝian ĉirkaŭaĵon alloga por vivi, ripozi, viziti… Por multaj alvenantoj la urbo estas tre bona elirpunkto por ekskursi tra „ Verdaj Pulmoj de Pollando”, al la Arbarego de Białowieża, al la marĉoj de Biebrza, la riveroj Narew kaj la Bug, al ĉarmaj, malnovaj urbetoj kaj vilaĝoj de Podlaĥio. Bjalistokon oni povas atingi per trajno, aŭtobuso aŭ automobilo. En la urbo troviĝas malgranda aeroporto Krywlany, uzata nur por sportaj kaj instruaj celoj. Tie povas alteriĝi kaj starti nur malgrandaj, privataj aviadiloj kaj balonoj. En la urbo kruciĝas vojoj kaj fervojoj: landaj kaj internaciaj. Ĝi troviĝas ĉe la internacia fervojo Berlino-Varsovio-Sankt Peterburgo–Moskvo. Tra ĝi pasas vojoj el okcidenta Eŭropo tra Pollando al Belorusio, Litovio, Latvio, Estonio kaj Rusio. Planata estas grava internacia vojo „Via Baltica” el Skandinavio al la suda Eŭropo. La situo proksime al la landlimoj kun: Belorusio, Litovio, Rusio kaj relative bonaj vojoj ebligas disvolvi ekonomiajn kaj kulturajn kontaktojn kun i.a landoj el orienta kaj okcidenta Eŭropo. Proksime al Bjalistoko funkcias la limpasejoj al Belorusio kaj Litovio i. a. en: Kuźnica Białostocka, Bobrowniki, Siemianówka, Czeremcha, Połowce, Ogrodniki, Trakiszki kaj Budzisko



**Adreso (provizora)**

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor’ Pajuk
8228 O’Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

**Estraro:**

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

**MEMBROKOTIZO**

Membro-subtenanto ; $40 jare;
Familia membro : $30, Regula: $20
Studenta aŭ pensiula: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

**KUNSIDO**

**okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:**

Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

### Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

26an de Aŭgusto – ĉiuj raportos pri siaj someraj spertoj kaj aventuroj

23an de Septembro – temo estos anoncata

